

Se la nocio vere temas pri la desegnita situacio, mi proponas sekvajn terminojn:

1) antaŭsignalilo por postvenonta signalilo

2) antaŭ-antaŭ-signalilo

Se temas pri iu alia indikilo – kiun mi ne povas imagi – eblas la terminoj kun necesa parenteza noto:

3) indikilo lini-okupa (por trakciilkondukisto)

4) indikilo de lini-okupiteco (por trakciilkondukisto)

Ankaŭ en alia difino mankas karakterizaĵo, kvankam sole povas koncerni indikilon en regpupitro de regejo:

09978 Indikilo kontrolata de anoncosistemo por libera trako, kiu informas, ĉu traksekcio estas libera aŭ okupita de veturilo.

bulgara	<i>указател за коловозна заетост</i>	itala	<i>indicatore di occupazione del binario</i>
ĉeĥa	<i>ukazatel obsazení koleje</i>	pola	<i>element planu torów ze świetlnym wskaźnikiem zajętości toru</i>
dana	<i>sporbesættelsesmeldelampe</i>	rumana	<i>indicator de ocupare a liniei</i>
franca	<i>voyant d'occupation de voie</i>	serba	<i>indikator zauzetosti koloseka (blok-aparat)</i>
germana	<i>Gleisbesetzmelder</i>	Esperanto	indikilo de trakokupiteco
hungara	<i>vágányút elem</i>		
	<i>vágányfoglaltság jelzessel</i>		

Jen du terminproponoj kun necesa parenteza noto:

1) indikilo trakokupa (regejo)

2) indikilo de trakokupiteco (regejo)

PIV-problemo

► **termino terminalo**

La nuna PIV ĉi koncerne enhavas sole nocion el komputiko:

terminal/o Vidigilo ekipita per klavaro, aŭ simila aparato, per kiu uzanto komunikas kun komputilo, ofte de alia loko.

En sia Granda Vortaro Germana – Esperanto *Erich-Dieter KRAUSE* menciis duan uzon de la termino por kvazaŭa stacidomo de flughaveno.

La fakprelego de *Ladislav KOVÁŘ* en Sofio, en kiu li donis la terminon „terminalo” ankaŭ al komuna stacidomo por fervojo, aŭtobusoj, taksioj kaj individua parkejo en *Česká Třebová*, instigis min diskutigi, ĉu ni proponu al PIV-redaktejo duan – nome trafikant – nocion de „terminalo”. Jen mia tekstpropono, kiu inkludas ĉiajn transportsistemojn:

terminal/o 1 (KOMPUTIKO) Vidigilo ... (kiel ĝis nun)

2 (TRAFIKO) Trafika konstruaĵo, kies elementoj estas aranĝitaj por ebligi plej favoran pasaĝertransiron aŭ transkargadon inter diversaj trafikiloj.

Kiel vi opinias? Ĉu vi proponas pli bonan tekston?

Karaj gekolegoj, ĉar mi ne volas prokrasti la sendon de niaj proponoj al PIV-redaktejo, mi petas esprimi viajn opiniojn en la sekvaj tri monatoj.

Anticipe dankas kaj bondeziras *Heinz Hoffmann*.

Terminara Kuriero

TeKu 139

Julio 2010

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablemail.de

Karaj gekolegoj, dum 62-a IFEF-kongreso en Sofio estis traktataj *RailLexic*-nocioj laŭ TeKu 137 kaj problemoj por planita PIV-revizio laŭ TeKu 126 kaj 138. En TeKu 138 korektu ĉe 06150 kaj 06936 la vorton „ruliĝgvidado” al „ruliĝglitado”.

RailLexic-nocioj

La partoprenantoj decidis pri jenaj terminoj:

00789	tempo antaŭ retroveturo	laŭ propono 1
01926	kondukotubo de dukondukila brems	laŭ propono 1
02279	retrovetura procedo (veturiloj, personalo)	laŭ propono 1
11895	glitado (efikdiferenco ĉe veturiloj kaj motoroj)	

laŭ nova propono pro inkludo de nerotaciantaj maŝinpartoj en la difino

12030 **trakciadadhero**

laŭ propono 1

12055 **tempo trafikiltransira**

laŭ propono dum kunsida diskuto

PIV-problemoj

► **homonimeco taluso**

(*RailLexic*-nocioj 08565 kaj 07496 en TeKu 126)


La partoprenintoj opinias, ke komuna termino kaj por tridimensia ŝutaĵo (07496) kaj por ties dudimensia supraĵo (08565) ne estas tolerebla. La termino „taluso” estu uzata sole por ŝutaĵo kun la iomete modifita difino „Artefarita altaĵo el tero aŭ rokpecoj, sur kiu pasas trafikvojo”. Ties dekliva supraĵo ricevu la terminon „talusdeklivo” kun la difino „Deklivo donita al taluso, digo, fosaĵo, tranĉeo aŭ terplenigaĵo”. La PIV-verbo „talusi” estu eligataj.

► **termino radiofonio** (TeKu 138)

La partoprenintoj opinias, ke la termino ne restu sinonimo por „radiotelefonio”, sed ricevu la difinon „Sistemo de transsendado de signaloj, uzanta elektromagnetajn ondojn”.

► **radiko mobil-** (TeKu 138)

La partoprenintoj kontraŭas la proponon, enigi en PIV novan adjektivon „mobil/a” kun la difino „Translokebla kaj diversloke funkciebla”. Ili opinias, ke la adjektivo „movebla” sufiĉas por klara esprimo.



Sufiĉa tempo por transiri

► verbo **movi** (TeKu 138)

La partoprenintoj opinias, ke la 2-a PIV-difino „Ŝanĝi la pozicion de membro aŭ korp parto” ne estas kompleta, sed ke necesas en ĝi aldoni „...”, aŭ de artikhava, fleksebla aŭ turnebla objekto”.

► verbo **kargi** kaj ties rilato al **ŝarĝo** (TeKu 138)

La partoprenantoj konsentis al la propono, ke la transitiva verbo kun prepozicio celu al transporta objekto (ekzemple enkargi, elkargi, surkargi, dekargi, transkargi barelojn), dum tiu verbo sen prepozicio laŭ PIV celas al transportujo (ekzemple kargi, malkargi vagonon per bareloj).

La 2-a PIV-difino de „ŝarĝo” (Tuto de varoj, transportataj de veturiloj) kreis nedeziratan sinonimon al „kargo”. Tiu difino estu ŝanĝata al „Pezo de kargo”. Sekve la PIV-verboj „elŝarĝi” kaj „transŝarĝi” estu anstataŭigataj per

- „elkargi” kun la difino „Elmeti objekton el transportujo” kaj
 - „transkargi” kun la difino „Meti objekton de unu transportujo al alia”.
- La nocio „ŝarĝisto” kaj la ekzemplo „*transŝarĝi kargon*” estu eligataj.

► ĉu **puŝadi** aŭ **ŝovi** (TeKu 138)

La partoprenintoj kontraŭas la proponon, aldoni 3-an difinon de „ŝovi” koncerne veturilon (Puŝadi antaŭ si) kompare kun 2-a difino de „treni” (Tiradi post si). Sekve restu „lokomotivo puŝada” anstataŭ „lokomotivo ŝova”.

Jen kelkaj **novaj taskoj**:

RailLexic-nocioj

► **Pri permesiva signalilo**

Permesiva signalilo (12998) estas kantoniga signalilo (08157), kiu en pozicio „haltu” sub determinitaj kondiĉoj estas preterveturebla sen speciala permeso. Se tia signalilo estas daŭre permesiva, koncerna signalilkaraktiza plato (06365) – pleje fiksita ĉe la signalilmasto – informas trakciilkondukistojn pri la permesiveco.

Ĉe iuj fervojoj ekzistas ankaŭ kantonigaj signaliloj nur porokaze permesivaj. Ĉe ili komplementa lumsignalo informas pri aktuala permesiveco. Pri tia lumsignalo temas jenaj du nocioj en *RailLexic*:

03732 Komplementa indiko karakterizanta haltpozician signalilon kondiĉe preterpasebla.

bulgara	<i>сигнална светлина за преминаване през сигнално устройство</i>
ĉeĥa	<i>přídavné světlo na návěstním stožáru pro permissivní jízdu</i>
dana	<i>permissivt stop (Kendes ikke på dansk)</i>
franca	<i>feu de permissivité</i>
germana	<i>Permissivlicht</i>
hungara	<i>kiegészítő fény permisszív továbbhaladásra</i>
itala	<i>segnale di permissività temporanea</i>
pola	<i>dotatkowe światło na sygnalizatorze zezwalające na jazdę</i>
rumana	<i>indicație permisivă a semnalului</i>
serba	<i>dotatno svetlo na signalnom stubu za prolaz pored signala</i>
Esperanto	marklumo por permesiva signalil-preterpaso

08143 Signalo permesanta atenteme malrapidan preterpason ĉe haltpozicia signalilo al eventuale okupita trako.

Ĉi tie la origina franca termino *signal d'appel en manoeuvre* verŝajne konfuzigis kelkajn tradukistojn, ĉar la franca *manoeuvre* estas ne nur fervoja manovrado, sed ankaŭ ĝenerale manipulado aŭ eĉ artifiko:

ĉeĥa	<i>přivolávací návěst</i>	itala	<i>segnale di chiamata in manovra</i>
dana	<i>rangergrænsemærke</i>	pola	<i>sygnał wstrzymania manewrowania</i>
germana	<i>Einrücksignal</i>	rumana	<i>semnal de chemare la manevră</i>
hungara	<i>tolatási hatarjelző</i>	serba	<i>manevarski signal za zaustavljanje</i>
		Esperanto	haltsignalo por manovrado

Nia tasko estu esplori, ĉu vere – kiel mi supozas – ambaŭ nocioj temas pri la sama signalo, ĉar la karakterizaĵoj en ambaŭ difinoj enhave preskaŭ egalas. Se jes, mi proponas uzi en Esperanto kaj por 03732 kaj por 08143 la pli kompreneblan difintekston 08143, kaj vortigi la terminon al:

signalo por permesiva veturo

Por komparo jen la originaj francaj difintekstoj:

- 03732 (*feu de permissivité*):

Indication particulière permettant de traiter temporairement un signal d'arrêt absolu en signal permissif.

- 08143 (*signal d'appel en manoeuvre*):

Signal auxiliaire permettant le franchissement d'un signal d'arrêt absolu à l'arrêt pour effectuer un mouvement à basse vitesse sur une voie pouvant être occupée.

► **Pri trakokupa indiko**

La sekva difino ne sufiĉe klarigas econ kaj taskon de aparato:

09975 Signalilo / Indikilo ĉe fervojlinio por informi trakciilkondukiston pri okupiteco de determinita liniosekcio.

Jen la franca originalo:

- *Dispositif placé le long de la voie qui montre au mécanicien l'état d'occupation d'une section désignée de la voie.*

bulgara	<i>указател за заета линия</i>	itala	<i>indicatore di veicoli in linea</i>
ĉeĥa	<i>ukazatel obsazení tratě</i>	pola	<i>wskaznik zajętości toru</i>
dana	<i>togdetektering</i>		<i>szlakowego</i>
franca	<i>voyant de circulation en ligne</i>	rumana	<i>indicator de linie ocupată</i>
germana	<i>Besetztanzeiger</i>	serba	<i>indikator zauzetosti pruge</i>
hungara	<i>vágányfoglaltság jelző</i>	Esperanto	indikilo lini-okupa

Ĉu franca kolego, kiu konas la aparaton, povas priskribi ĝin? Laŭ faka literaturo iuj fervojoj uzas signalon por informi trakciilkondukistojn pri okupiteco de la tria liniosekcio malantaŭ la koncerna signalilo – sen neceso, jam ek ĉi tie bremsi:

